

Heinrich Heine,  
Lorelejo  
*tradukita de Joachim Gießner*

Heinrich Heine,  
Lorelej'  
*tradukita de Leopold Elb*

Heinrich Heine,  
Lurleia  
*tradukita de N. N. 01*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Si kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodii'.

Ŝipiston en eta boato  
Turmentas koremoci'.  
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,  
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo  
la ondoj lin kun boat'.  
Nun kuŝas li en la profundo  
pro Loreleja kantad'.

...

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheligas,  
Fluadas la Rejn' en frankvil',  
La supro de l' monto lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizagón kronas  
Mirinde la ora harar'.

Si uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuſas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronus finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

...

Ignoro, quid id sibi velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabellam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lucescit,  
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma frontis,  
Se pectit auricomata.

Aureolo pectine pectit,  
Carmen canens procul,  
Mirandum id habet modum  
Nec non virilem simul.

In cymba navitam mille  
Angores feri tenent,  
Non videt scopulos ille,  
Ocli non si sursum vident.

Opinor undas devorare  
Nautam cum navicula,  
Effecit solo canendo  
Lurleia id dea.

...

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: *Josef.Schiffer@t-online.de*), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (\*1912-08-04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)